




Nº 10 - OKT / 83

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Jameiro-RJ BRASIL (Tel: 2326309)



IMPRESSO

ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE BEL

La 29an de Oktobro, sabaton, je la 3a p.t.m., oni okazigos en la sidejo de BEL la duan Generalan Kunsidon de la nuna jaro. Jen la tagordo:

1. Financa Raporto rilata al 1982 ;

2. Bugeto por 1984 kaj

J. Generalaj Temoj.

Tridek minutojn post la Generala Kunsido, S-anoj José Pedro Milagres (Niterój-RJ) kaj Evaldo Pauli (Florianopolis -SC) prezentos al la ĉeestantoj sintezan raporton pri la 68a

Universala Kongreso.
S-ro Milagres ĉeestis la Kongreson, kiel anstataŭanto de la Komitatano "A", reprezentanta BEL (S-ro Sylla Chaves).
Prof. Evaldo Pauli, estis elektita prezidanto de la ĵus fondita FILOZOFIA ASOCIO TUTMONDA.

IV-a JARKONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Lau invito de Pernambuka Esperanto-Asocio , BKE okazigos de la 12a ĝis la 15a de Novembro 1983 , en la historia nordorienta urbo Olinda-PE , sian jarkongreson , kies temo estas sendube tre aktuala : ESPERANTO EN UNIVERSITATOJ KAJ LERNEJ-OJ. Adreso de la Loka Organiza Komitato : Associação Pernambucana de Esperanto - Rua Siqueira Campos 279 , sala 905 - Caixa Postal 1139 -BR 50.000 - Recife-PE.

KARAVANO AL NORDORIENTO - OLINDA, PE

Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Av. 13 de Maio 47, s/loja 208, CEP 20.031, Caixa Postal 1887, Rio de Janeiro, Tel 220 7485) atendas vian aliĝon al la karavano, kiu ekveturos autobuse al Olinda-PE, por partopreni la IV-an JARKON GRESON DE BKE. Ekveturo al Olinda: 1983.11.09 (8a vespere), apud la sidejo de KKE. Ekveturo de Olinda: 1983.11.17 Vojaĝbileto: la kotizo, ĝis la 30a de Okt 83-65 50.000,00; 2a kotizo, ĝis la 30a de Nov 83-65 25.000,00; 3a kotizo, ĝis la 30a de Dec 83-65 25.000,00.

20a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO-JULIO/84

La 29an kaj 30an de Septembro lasta, la prezidantoj de BEL, KKE kaj EKE denove kunsidis, kiel planite en Regularo de Nacia Esperanto-Komisiono, por ŝanĝi spertojn, arigi ideojn kaj prezenti konkretajn decidojn rilatajn al komuna agado favore al la Brazila Esperanto-Movado.

Okaze de tiu lasta kunsido oni oficiale aprobis la sugeston faritan de prezidanto de BEL en la XVI-a Seminario de Esperanto (Ouro Preto-MG), pri okazigo, en 1984, de la 20a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, sub la auspicioj de la tri asocioj, nome Brazila Esperanto-Ligo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Sajnis al la tri prezidantoj, ke tiu decido malaperigos iun ajn restantan suspekton pri manko de unueco en nia Movado.

Rilate al la dato, loko kaj aliaj detaloj koncernaj al la 20a Brazila Kongreso de Esperanto, ankaŭ estis aprobita la propono sendi al la lokaj asocioj cirkuleron kun klarigoj kaj deman doj por sondi, kiuj el ili kapablas kaj interesiĝas okazigi tiun gravegan eventon en sia propra urbo.

La Nacia Esperanto-Komisiono pretigos tiun cirkuleron kaj sendos ĝin antaŭ la fino de la kuranta monato, tiamaniere, ke la lo kaj asocioj respondu ĝis la 15a de Decembro kaj oni sukcesu elek ti la plej taŭgan urbon ĝustatempe, tio estas, maksimume, la 3lan de Decembro 83.

Oni esperas, ke ĉiuj lokaj asocioj ekpensu pri la afero. Pli da detaloj vi trovos en la sendota cirkulero, ĉe via loka asocio.

INSTITUTO BRASILEIRO DE ESPERANTO - ONI SERCAS INSTRUISTOJN

Se vi bone regas la internacian lingvon, kaj deziras kandidatiĝi por instrui E-on en bazaj kursoj de Instituto Brasileiro de Esperanto (Rua Florêncio de Abreu 126,49 - Cj 46, CEP 01030-São Paulo,SP) bonvolu kontakti ĝian direktoron, d-ro Adolpho M.Furtado. Oni intencas pagi salajron al la e-lektitaj instruistoj.

BRAZILO JUS VENKIS EN ITALIO

La brazila poeto Jorge das Neves , ano de BEL , venkis de-

nove internacian konkurson.

Ci-foje, laŭ la juĝoj de la kritikistoj poeto Aldo Giorgi,
p-rino Clelia Conterno Guglielminetti kaj d-ro Piergiorgio So
ranzo, li gajmis la unuan premion per la soneto AMIKECO, ori
ginale verkita por la Poezia Konkurso " INTERNACIA AMIKECO1983 ", sub la aŭspicio de Triesta Esperanto-Asocio (Via
Trento 1, I 34132, Trieste, Italio).

Fest- premiado okazos en TEA-sidejo dimanĉon, la 6an de Novembro 1983, kiam nia lando plifoje estos proklamita ĉaz-

piono.

La duan premion ricevos Malto ("Fino", de Carmel Mallia); la trian, Israelo ("Viv-krepusko", de J. Kohen-Cedek); la kvaran, Francio ("Spegulo", de Lilli Giloteaux); la kvinan, Italio ("Aktoro", de Lina Gabrielli) kaj la sesan, ankaŭ Italio ("Ĉe Vi", de Ada Aceto).

Fine de la pasinta jaro Jorge das Neves venkis per tri premioj la Duan Internacian Konkurson pri Troboj. Li ricevis la unuan premion, la duan kaj specialan mencion. Tiu konkurso pri la temo "AGO" omaĝis la Internacian Jaron de la Maljumu loj aŭspicie de Esperantista Asocio de San-Paulo.

Jorge das Neves, ĉiam kiel poeto, estas kunlaboranto de FONTO, de IMPULSO, de EKE-BULTENO. Ĉar li estas dulingva poeto, li ankaŭ kunlaboras portugallingve kun diversaj brazilaj revuoj. Li gajnis en 1979 la trian premion per la poemaro "La titude" en tutlanda poezia konkurso de la Beletra Akademio de Ribeirao Preto kaj en 1980 publikigis la poezian verkon "Poe sia dos Signos", kies lanĉo en la E-Movado okazis en la U-berlândia Seminario.

Nia samideano Jorge das Neves nepre ĉeestos la fest-premiadon por reprezenti Brazilon kaj viziti aliajn landojn. Li ekveturos rekte al Madrido, la 22-an de la kuranta monato.Pri kio ajn telefonu al lia hejmadreso (237-2211) ĝis la antaŭtago.

BRAZILANO NE NUR FILOZOFIAS , SED ANKAŬ MOVADAS

Prof. Evaldo Pauli , el Florianopolis-SC , estis elektita prezidanto de FILOZOFIA ASOCIO TUTMONDA , organizaĵo kreita okaze de la 68a UK , en Budapeŝto. Ŝajnas al ni , ke liaj kolegoj fakte " rekte pensas " , ĉar ili prave elektis diligentan batalanton , kiu ne nur " filozofas " , sed ankaŭ movadas

kaj verkas pri tiu kultura fako.
Lau informo ricevita de S-ano Pauli, la revuo SIMFOZIO, kies ĉef-redaktoro estas li mem, estiĝis la oficiala bulteno de la ĵus fondita asocio. Krome, li sciigis nin pri la lanĉo de lia verko REKTA PENSADO, okazinta en la 68a UK. Nun, ni atendas la aperigon de lia lasta verko: ENKONDUKO EN LA KATEGORIOJN DE ARISTOTELO, tradukita el la greka lingvo.

Pri la tria numero de la filozofia revuo SIMPOZIO, li aldonis, ke ĝi enhavos la Statutojn de la FILOZOFIA ASCCIO TUTMON DA, la prelegon faritan de li mem, okaze de la fondo de la asociom kaj la protokolon de la 1-a UNIVERSALA SIMPOZIO DE FILOZOFIO, ankaŭ okazinta en la 68a UK.

Se vi interesiĝas pri tiu serioza fako , nepre abonu SIMPO-ZION . Peranto : S-ro Gerai Alfredo Bays . Caixa Postal 49 . BR 89.800 - Chapeco-SC.

LA BRAZILA PENSO EN ESPERANTO- KULTURA ENTREPRENO
La eldonejo SHOGUN ARTE antau kelkaj tagoj diskonigis regularon pri la publikigo de LA BRAZILA PENSO EN ESPERANTO,
libro konsistonta el 300 verkoj elektotaj de Komisiono kunordigota de d-ro Diderto Freto. Laŭ la regularo, estos tri
kategorioj de verkoj: l. LA NUNA MONDO (eseo pri iu ajn
aktuala temo); 2. BRAZILA LITERATURO (originala prozo aŭ
poezio) kaj 3. LA GRAVECO DE ESPERANTO (eseo). Estos elektitaj la 50 plej bonaj tekstoj, po kategorio. Ĉiuj verkoj
en E-o. Enskribiĝojn oni akceptos ĝis la 31a de Oktobro 83.
La verkojn oni ricevos ĝis la 10a de Novembro 83. Por pliaj
detaloj bonvolu sin turni al SHOGUN ARTE (Caixa Postal 43021
- CEP 22.052 -Rio de Janeiro, RJ. Tel: 021 256-3553), kiu
estas preta sendi kopion de la tuta regularo.

SOCIETO ESPERANTO DE SALVADOR -UNUA ESTRARO

El la jus aperinta Societo Esperanto de Salvador (Caixa Postal 2550 - Ag. Cidade Alta - 40.000-Salvador, BA) , ni ricevis cirkuleron kun klarigoj pri ĝiaj celoj kaj intencoj . Ni arde deziras , ke la aperigo de tiu nova societo , ansta tau disdividi la fortojn , kiuj agas favore al la progreso de nia movado en tiu ŝtato , vere helpu la jam delonge batalantan ŝtatan asccion . Al la gvidantoj kaj konsilantoj de SES ni deziras fruktodonan oficperiodon . Jen ili : Prez- Marcelo Figueiredo Correia da Rocha; Vicprez- Romilson Menezes Mota ; Sek- Henrique Solon Brandao Knoedt ; Kas-Kleber Oliveira de Souza . Financa Administra Konsilantaro: Leopoldo Henrique Knoedt , José Saraiva Matos kaj Manoel dos Borges Santos.

BARRA MANSA ESPERANTO-KLUBO - NOVA ESTRARO POR 83/85

La 10an de Septembro 83 , en la sidejo de BAMEK , oni elektis kaj enoficigis la jenajn samideanojn , kiuj oficperio dos dum 83/85, kiel estraranoj de tiu vigla asocio:

Prez- Ide Ebeling ; Vicprez- Fortunata Mattiaz ; 1-a Sek-Denise A. Deslandes ; 2a Sek - Iara A. Arneiro ; Kas- Wilson Deslandes : Bibl- Ecy S. Ferreira ; Kontrola Konsilantaro : Francisco Nogueira , Daury Arneiro kaj Cleusa Maria L.Cesar. Al ĉiuj , miajn plej varmajn salutojn kaj bondezirojn !

UNESKO-KURIERO N-RO 9 / SEPTEMBRO / 83

Se vi ankorau ne foliumis la konatan revuon UNESKO-KURIERO (" O CORREIO DA UNESCO "), profitu la okazon kaj tuj aĉetu la Septembran numeron , čar ĝi pritraktas nur lingvojn. Certe placos al vi la ege interesaj artikoloj. Krome , ni atentigas vin pri la reklamo , kiun Fondaĵo Getulio Vargas denove aperigis sur tuta paĝo, favore al la lernado de la Internacia Lingvo. Oni powas aboni la portugallingvan eldonon de O CORREIO DA UNESCO pere de Fondaĵo Getulio Vargas (Caixa Postal 9052 - Rio de Janeiro, RJ - CEP 20.000). Po monata ek zemplero : 88 450,00 .

NOVA LONGEDAÜRA DISKO DE SYLLA CHAVES

Post longa atendado en la fabrikejo pro manko de importita materialo, finfine pretiĝis la dua longedaura disko de Sylla

Chaves : BESTETOJ , BESTEGOJ KAJ BESTACOJ. Ci estas dulingva , kaj ĝia Esperanta parto estas 22-minuta. Gia " kovrilo-libro " havas 50 bildojn . La tuto (disko kaj libro) kostas 8 4.800,00 , en ĉi tiu trimestro.

PARANÁ ESPERANTO-ASOCIO - GASTAMA KAJ AKTIVA ASCCIO

Pasintan monaton , prezidanto de PEA , S-ano Itacir Lutchemberg vizitis sidejon de BEL kaj sciigis nin pri la bonfarto de sia asocio. La 24an de Septembro, la prezidanto de BEL trovis la okazon reciproki tiun afablan viziton ,kaj persone rimarki la rezultojn de seriozaj klopodoj faritaj ne nur de la estraranoj de PEA (Rua Dr. Muricy 542 -sala 1201-Caixa Postal 1701 - CEP 80.000 Curitiba-PR), sed ankau de juna volontula trupeto.

Speciale al la 12 jusbakitaj samideanoj, kiuj faris la ba zan ekzamenon en tiu dato , kaj al kiuj Brazila Esperanto-Ligo aljuĝis la respondajn diplomojn , ni elkore salutas kaj

bonvenas pro la membriĝo al nia landa asocio.

ESPERANTO : LINGVO POR LA KOMUNIKA ERAO

D-ro Joaquim do Couto , inda prezidanto de Niteroi Esperanto Klubo, aperigis en la Informa Bulteno n-ro 15, Sept/83, de Spiritisma Grupo Francisco de Assis (Rua Djalma Dutra 28 , Niteroi-RJ) detalan raporton pri la kunsido aranĝita de BEL kaj KKE, la 8an de Julio, ĉe Fondaĵo Getulio Vargas, kiam D-ro Victor Sadler prelegis pri ESPERANTO; LINGVO POR LA KO-MUNIKA ERAO.

ESPERANTO EN 5-MINUTA TELEVIDA PROGRAMO

Ciutage , kiel ferma programo , Jonas Rezende , el TVE-2 (Eduka Televida Stacio , Rio de Janeiro-RJ), prezentas 5minutan mesagon sub la generala titolo " CONVERSA DE FIM-DE-NOITE " , tio estas , NOKTOFINA BABILADO . Kvankam la progra mo estas mallonga kaj malfrua (proksimume je la noktomezo) oni rimarkas . ke ĝi estas unu el la plej laudataj de la spe ktantoj de tiu TV , lau la statistikoj publikigitaj de fakuloj pri TV-aĵoj. La temo elektita por la mesaĝo de la 3a de Septembro lasta estis : ESPERANTO EN LA NUNA TEMPO. La komen tarioj faritaj de Jonas Rezende pri la lastaj konkeroj rilataj al E-Movado estis elprenitaj , kiel li mem diris , el la publikaĵoj , kiujn li regule ricevas el BEL.

PRI NIA MEMBRARO : LASTAJ CIFEROJ

MEMBRARO	MS	Ml	M2	DM	BM	SUME
gis 1983.08.31	231	123	17	25	5	398
gis 1983.09.30	264	126	18	25		425

UEA: NOVAJ KOTIZOJ POR 1984

Pere de cirkulero (1983.08.23) , la direktoro de la Centra Oficejo de UEA sciigie nin pri la jus fiksitaj kotizoj por 1984 . Aldone , li klarigis , ke la Komitato aprobis ĝeneralan kotizaltiĝon de 12%. Tamen , pro la ekonomiaj malfacilaĵoj en Brazilo kaj najbaraj landoj, UEA ne kalkulis tiun altiĝon por la latinamerikaj kotizoj.

Interkonsente, la du landaj asocioj (BEL kaj KKE) decidis subteni la samajn kriteriojn disvastigitajn de "BEL-informas " n-ro 4 / Apr/83, rilate al la kalkulado de kruzejraj ekvivalentoj por UEA-kotizoj / 1984.

Resume , jen la kriterioj :

- 1) La ekvivalenta kotiztabelo por Brazilo baziĝos sur la samaj valoroj fiksitaj de UEA , lau JARLIBRO 83 , por la internacia respondhupono , tio estas : 1 rpk = 0,9 gld.;
- 2) La du perantoj akceptos de la membroj pagon , pere de respondkuponoj au en

ekvivalentaj kruzejroj :

3) Por la kalkulo de la ekvivalentaj kruzejroj , la interesitoj devas multobligi la nombron de la necesaj respondkuponoj por ĝia aktuala valoro . Do , suficas , ke la interesitoj demandu al iu ajn posta agentejo la kurantan prezon de la rpk por fari la nepran konverton al kruzejroj.

Fine , ni prezentas al vi la novan tabelon por UEA. Krome , por faciligi la kom paron inter la kotizoj de 1983 kaj 1984 , ni represas la tabelon de la kuranta ja-

KC	TIZOJ	MA	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
1983	gld rpk	0,78 1 480,00	15,60 18 8.640,00	39,00 44 21.120,00	23,40 26 12.480,00	13	78,00 87 41.760,00
1984	gld rpk	0,80 480,00	16,00 18 8.640,00	40,00 45 21.600,00	24,00 27 12,960,00	12,00 14 6.720,00	80,00 89 42.720,00

ANTAU OL SENDI VIAN KOTIZON , NEPRE KONTROLU , CU LA RESPONDKUPONO ALTIGIS. SE JES , REFARU LA KALKULOJN . Ekde la 7a de Oktobro .1.rpk = 5 480,00.

HEROLDO DE ESPERANTO: NOVAJ KOTIZOJ. PROFITU LA OKAZON:

El cirkulero sendita de HdE , la 3lan de Augusto 1983 , ni prenis la jenajn informojn :

"Ciuj tutnovaj devizaj abonantoj , kiuj pagos nun če vi por 1984 (tiu oferto validas nur gis 31.X11.83) ricevos senpage la lastajn ĉijarajn numerojn , ekde la momento de abono ĝis la fino de 83 (ĝis eventuala elĉerpiĝo) ."

" Sciencaj Suplementoj: en 1984 aperos 16 numeroj plus antaŭe planite Scienca Suplemento pri ekologio (red. Janusz Sulzycki , Pollando). Supozeble aperos kro-

me speciala kanada kongreslanda Suplemento."

Finfine, la plej bora informo : La baza jarabono de EdE por 1984 restas senŝanĝa. Tamen , por nia lando estas speciala tarifo : Marpoŝte - US\$ 7,00 . Aerpoŝte-US\$ 10 Bonvolu rimarki, ke pro transpagaj malfacilaĵoj, BEL nur akceptos internaciajn respondkuponojn au iliajn respondajn valorojn en nia nacia valuto , lau la suba tabelo :

JARABONOJ		MARPOSTE AERPOSTE		RIMARKOJ:	
1984	US\$	7,00 22 10,560.00	10,00 31 14.880.00	por HdE , 1 rpk = 17 Fb ka 1 USS = 3.05 rpk	

EL POPOLA CINIO - ABONVARBA KAMPANJO

Abonvarba kampanjo programita de EPC dauros de la la de Novembro 83 ĝis la 29a

de Februaro 84.

Avantaĝoj por la abonantoj : Ĉiuj , kiuj faras abonon aŭ reabonon en la abonvarba kampanjo, povas profiti 20% da rabato kaj senpage ricevos koloran kalendaron en Esperanto. La kalendarojn oni ekspedos rekte el Cinio al vi . Jen la kotizoj :

JARA BONOJ		1 JARO	2 JAROJ	3 JAROJ	RIMARKOJ:	
GIS 1984.2.29	USS rpk {\$	3,20 8 3.840,00	5,60 14 6.720.00	8,00 20 9,600,00	Por EPC , 1 rpk = 0,42 USS	
EKDE 1984.3.1	USE rra	4,00 10 4.800,00	7,00 17 8,160,00	10,00	1 US\$ = 2,38 rpk	

RIMARKU LA KODON SUR VIA ADRESETIKEDO!

Se super via nomo aperas kodo, kiu komenciĝas per "E183", tio signifas, ke vi pagis la jaran kotizon de BEL gustatempe. Do, ni dankas vin pro tio.

Se via kodo komenciĝas per "E182", tio signifas, ke , almenau gis la 30a de septembro pasinta, ni ricevis noniun. pagon rilatan al via reanigo por 1983. Do, ni atendas vian reagon.

Se la kodo komenciĝas per "E2", tio signifas, ke vi ne estas (au ne plu estas) oficiala membro de BEL. Do, se vi volos, ni plezure sendos al vi membro aligilon.

FACULDADES INTEGRADAS DE UBERABA Lau informo sendita de S-ano Evandro Silva Martins (Rua Miguel de Stefani, 298 , Jardim Induberaba , 38.100-Ubera ba, MG), post ekspozicio aranĝita en la supera edukejo Faculdades Integradas de Uberaba , pri la internacia lin gvo , dekoj da universitatanoj enskribiĝis en la kursoj de E-o , de li orga nizitaj , kaj funkciantaj en tiu fakul tato ekde Septembro 83.

FEDERACIA UNIVERSITATO DE PARANA Venontjare E-o estos unu el la nedevi gaj lernobjektoj elekteblaj en la Bele tristika Departemento de la Federacia Universitato de Parana , kie Prof. Geraldo Mattos lekcias. Ni atendas la oficialan konfirmon pri tiu grava nova-10.

FEDERACIA UNIVERSITATO DE JUIZ DE FORA Prof. Jose Passini sciigis nin , ke nun tempe li instruas E-on al 102 geestuden toj en Federacia Universitato de Juiz de- Fora .

ESPERANTO - LINGVO INTER-NACIA

Prelegoj, kun diapoziti voj, farotaj de mia sekre tariino, Mônica Boller, ĉe UNIDADE ESCOLAR UNIÃO CAI XEIRAL , en la urbo PARNA IBA-PI . La 3an .4an kaj 7an de Movembro 1983.